

LA FREMDUL'

G. Moustaki

Esperantigo: Michel Dereyger (Mikelo59)

Kun vizaĝ' mia de fremdul', greka paŝtist', migranta jud',
kun harar' mia en la vent':
helblua estas la okul', ĉiam aspektas mi revul' elrevigita en real'.
Kun mia mano de ŝtelist', de senhejmul', de muzikist' mi ofte rabis en ĝarden'.
Multege trinkis mia buŝ', kisis kaj mordis mi per dent', ĝis la malsat' nenia venk'.
Kun vizaĝ' mia de fremdul', greka paŝtist', vaganta jud', eta ŝtelist' kaj vagabond',
multe sin banis mia haŭt' en la somera, varma sun', en lito dolĉa de fraŭlin'.
Mirinde sciis mia kor' tre suferigi post dolor', sed ĉio sen revoluci',
sen ia sav' por la anim', se ŝanco al la paradiz' kaj eĉ al la purgatori'.
Kun vizaĝ' mia de fremdul', greka paŝtist', migranta jud',
kun harar' mia en la vent',
mi venos, mia kaptitin', vivplena font', ĝemelanim' kaj trinkos je via junec'.
Ja, estos mi via revul' aŭ via princ', adoleskul' laŭ via plaĉo kaj elekt'.
El ĉiu tago faros ni tutan eternecon da am', kiun ĝis morte vivos ni.